
# Boletín

de la Federación Española de Esperanto



Nº 294 JANUARO - FEBRUARO 1990

# "BOLETIN" BULTENO DE HISPANA ESPERANTO - FEDERACIO

Centra Oficejo: c/Rodriguez de San Pedro,13.-3º,P-7.-28015-MADRID.-
••••••

Prezidanto:
Antonio Alonso Núñez
Apartado 714
E-15780-SANTIAGO DE COMPOSTELA
••••••
Sekretario:
Manuel López Hernández
Apartado 369
E-41080-SEVILLA (Hispanio)
••••••
Vicprezidanto:
Alberto Franco Ramirez
••••••
Vicsekretario:
Luis Gil Pérez
••••••
Kasisto:
Fco.José Nieves Pavón
Pagojn sendu al: H.E.F.
Poŝtkonto nº 14.011.966
Av.República Argentina, 29
E-41011-SEVILLA (Hispanio)
••••••
Libro-Servo de HEF:
Luis Hernández Garcia
Apartado 119
47080-VALLADOLID.(Hispanio)
••••••
"Fundacio Esperanto de HEF"
Sekretariino: Inés Gastón
Pº de la Constitución,35.-4º
50001-ZARAGOZA (Hispanio)
••••••
"Esperanto Fundacio F.Soler"
Direktoro: Juan Fontecha
Duque de Calabria, 4.-2º
E-46005-VALENCIA (Hispanio)
••••••
-Junulara Sekcio (HEJS)
Prezidanto: Jordi Ferré
Apartado 23484
E-08028-BARCELONA (Hispanio)

Ĉef-Redaktoro:
Antonio Marco Botella
Av.Compromiso de Caspe, 27. 9º.C
E-50002-ZARAGOZA (Hispanio)
••••••
Redaktoroj kaj Kunlaborantoj:
Salvador Gumá Clavell
Miguel Fernández Martin
Vicente Hernández Llusera
Andrés Martin González
Luis Serrano Pérez
Miguel Gutierrez Aduriz

---

Enhavo:


| | |
|---|---|
| Prozo kaj poezio survoje.... | 3/4 p |
| Nunjara kongresurbo ........ | 5/6 " |
| Artaj,sciencaj kult.horoj... | 7 " |
| Viglas la Movado............ | 8/9 " |
| Konsideroj pri pronomo"ci".. | 10/11 " |
| La 50ª Hispana E-Kongreso... | 12 " |
| Kial malsukcesis revuo H.S. | 13/14/15" |
| Recenzo pri libro KJ-metodo | 16 " |
| Anonimaj romancoj........... | 17/18" |
| El P.C. kaj E-Video-servo... | 19 " |
| Cu U.K. en Valencio?........ | 20 " |
| Esperanto kaj Universitato.. | 21/22 " |
| Belaĵoj el Hispanio......... | 23 " |


---

Kovrilo: La impona Centro"Borja" kie okazos la 50ª Hispana E-Kongreso.

---

NOTO.-Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aútoroj mem.

---

# PROZO KAJ POEZIO SURVOJE

*Jes, kun iluzio nia revuo denove ekpaŝas. De nun, ĝi, nia gazeto, trairos ĉiujn vivovojojn de tiu ĉi nova periodo akompanante nian Federacion, jen celebrante kun ĝojo ĝiajn atingojn, jen esprimante la amaron de niaj bedaŭroj pro la propraj malsukcesoj...ĉar, neeviteble, en la vivo de homoj, institucioj aŭ asocioj tute ne mankas horoj por ĝojoj aŭ malĝojoj, por la prozo same kiel por la poezio.Kaj certe, nia Federacio ne estas escepto. Kiel organo de HEF, nia gazeto intencos ĉiam reprodukti tiujn animstatojn.Fidele kaj ame, kiel ni faras hodiaŭ:*



*La 10an kaj 11an de Marto kunvenis denove la HEF-estraro en Madrido kun kelkaj aktivuloj. En tiuj tagoj jam estis aperinta la unua numero de "Boletin" presita en Zaragozo, kaj en ĝi oni diskonigis la unuajn gravajn atingojn de la nuna Prezidanto: atentindan subvencion de la ŝtato kaj pagatan postenon por esperantisto en Universitato. Kaj tamen, tiuj atingoj, apenaŭ estas substrekindaj el la ampleksa kaj ambicia listo, kiun ĉiu estrarano de la nova skipo gardas en sia privata arkivo (kaj ankaŭ en la interno de si) kiel celon de nia tuja kaj estonta agado. Prave, antikva proverbo diras, ke por konstrui preĝejeton oni devas, nepre, projekti katedralon! Tiu, kaj ne alia, estas la utila devizo de la nuna HEF-estraro.*

*En Madrido oni studis atente kien iros niaj venontaj paŝoj, kiel ŝveligi niajn planojn de aktualeco kaj efiko, kiel prezenti antaŭ la nuna socio modernan projekton pri lingvo internacia jam jarcenta, kiu tamen jam perdis la unuan batalon por la disvastiĝo, momente venkita, ne de alia lingvo pli racie konceptita, sed precipe dank'al la forto de hegemoniaj kaj ekonomiaj influoj tute provizoraj, kies faktoroj facilaj al ŝanĝo firmigas tiun provizorecon.*

*Kiu estas nia vojo? Kiu nia plano? Antaŭ ĉio aktualigi nian agadon, starigi amikajn rilatojn kun la registaroj por legitimi niajn aspirojn, postuli (se necese) nian rajton pri helpo kiel kultura minoritato, forgesante nian pasintan almozan sintenon kaj enirante kuraĝe kun la adekvata intelekta formiĝo en universitatojn, kolegiojn, televidon kaj ceterajn prestiĝajn publikajn instituciojn... Ke niaj kongresoj ne plu estu amikaj banalaj renkontiĝoj, ke niaj prelegoj ne plu estu interna afero de esperantistoj sed seriozaj publikaj komunikaĵoj, kaj niaj eldonoj estu veraj kulturaj efikoj por nia socio!.*

*...Kaj nia revuo, kion ni faru el nia jam historia "Boletin"? Unue ni diru, ke ĉar ĝi estas revuo de Esperanta asocio por esperantistoj, ni ĝin publikigos, prefere, en Esperanta lingvo. Ni penos aperigi ĝin, minimume, dumonate. Kaj ilustros ĝiajn paĝojn per desegnoj. Fotoj,nur de tempo al tempo tiuj de personoj. Sur la kovrilo: fotoj kaj bildoj pri belaĵoj el Hispanio (kun mallongaj klarigoj), ĉarmaj naturaj anguloj, historiaj monumentoj, famaj pentraĵoj,ktp. Kaj kiel plej grava enhavo: artikoloj pri internaj problemoj, informado, paĝoj pri lingvistiko, Esperanta literaturo, Didaktiko, Historio, Sociologio, traduko de klasikuloj,ktp. Mi ankaŭ dezirus meti paĝon en Esperanto pri poetoj kaj eseistoj elstaraj de la pluraj iberiaj kulturoj: kataluna, galega, vaska, valencia,ktp., kaj, kompreneble, ankaŭ la plej belajn paĝojn de iliaj respektivaj literaturoj.*

*Tion ni intencas fari iom post iom kaj ĉiam fidante je la kunlaborado de la plej kapablaj, feliĉe ekzistantaj en nia lando...*

*Mia pretendo estas, ke nia revuo akiru kontentigan nivelon kaj spegulu, ne la brilon de tiu ĉi pli ol modesta redaktoro, sed la propran vian, tiun de miaj kunlaborantoj, de homoj apartenanta al kultura minoritato, aspiranta, ne nur disvastigi la mesaĝon pri lingvo internacia por ĉiuj homoj kaj popoloj de la mondo, sed ankaŭ jam elmontri, ke tiu ĉi lingvo, Esperanto, meritas la hegemonion kaj la unuan lokon kiel esprimilon de universala kulturo.*

*Antonio Marco Botella*

# NIA NUNJARA KONGRESURBO

Sant Cugat del Vallés estas urbo de la aŭtonoma kataluna distrikto "El Vallés Okcidental". Ĝi troviĝas apud la deklivo de la montaro "Collserola", kaj etendiĝas ĝis la rando de la malaltaĵo, kiu donas nomon al ĉi tiu regiono de Katalunujo, "El Vallés Okcidental".

La urbo estas ĉirkaŭata de 1800 hektaroj el arbaro kaj aliaj 380 hektaroj por paŝtaĵoj. La precipaj rikoltoj estas cerealaj, tritiko, hordeo, krom vitiplantejoj kaj terpomoj, kvankam nuntempe la agrokulturo cedas sian lokon al la industrio kaj vilaoj por ripozado. De la komenco de la nuna jarcento la urbo fariĝis vera loko por ripozado; konsekvence oni konstruis kaj plu konstruas multajn kaj elegantajn vilaojn. La plilongigo de la fervojo de Sarriá al Terrassa kaj Sabadell donis tiun grandan impulson al la urbo. Cetere oni devas aldoni, ke baldaŭ oni inaŭguros la tunelon de Valvidriera, tra kiu Barcelono elŝprucigos milojn kaj milojn da barcelonanoj al Sant Cugat kaj ceteraj urboj de "El Vallés Okcidental". La proksimeco al Barcelono kaj la novaj fervojoj kaj aŭtoŝoseoj konstante plialtigas la nombron da loĝantoj en nia kongresurbo. De Sant Cugat al Barcelono estas nur 15-kilometra distanco.



Eble la industriigo de Sant Cugat ne tiom rapidis, kiom en aliaj urboj de la sama distrikto, tamen lastatempe la urbo akiras gravan forton industrian, al kiu oni ,devas aldoni la starigon de la televida TV-2 kaj la anonco pri la establo de firmao de la kina arto, laŭdire la plej granda de Eŭropo. Sendube ni devas rimarkigi la ceramikan industrion, en fako de brikoj, tegoloj, ktp.

La vivo kaj malvolviĝo de Sant Cugat, ĉiam okazis ĉirkaŭ ĝia monaĥejo. Nuntempe la evoluo estas tute alia. La monaĥejo restas nur, kiel grava trezoro arta kaj historia de la urbo. Interne de la urba distrikto de Sant Cugat troviĝas ankaŭ la preĝejo de "Campanyá", la kastelo de "Canals", la preĝejoj de "Sant Vicenç de Vallareu", Sant Llorenc de Fontcalçada", "Sant Medir", la antikva parokejo de "Santa Maria de Gausau", nuntempe nomata "Sant Adjutori", la ermitejo "Sant Crist de LLaceresc". Kaj pli moderna, nepre menciinda estas la Fakultato de Teologio de "Francesc Borja", kie okazos nia kongreso.

La monaĥejo de Sant Cugat ludis gravan rolon en la historio de Katalunio, kaj evidente, ne estas eble rakonti ĉi tie ĝian tutan

influon en la pasinta kataluna historio: ĝis la jaro 878a, la originoj de la monaĥejo ne aperas fidindaj. La kultado al Sant Cugat estis kaŭzo por konstrui preĝejon, sed verŝajne tiu preĝejo estis detruita de la araboj kaj rekonstruita post la rekonkero de Barcelono (j.801a). En sama loko estis konstruita la monaĥejo, laŭdire de Carlomany (j.785a). La unua abato estis Ostofred. Poste la monaĥejo estis regata de la episkopo de Barcelono, kies abato estis Frodoni, laŭ decido de la reĝo Lluis el Tartamut. Ne fidinda rakonto diras, ke aliaj ses abatoj regis ĝin: Deodat, Alvabald, Sunifred, Donadeu, Otger kaj Odilló.

La submetiteco de Sant Cugat al la episkopo de Barcelono estis kaŭzo de multaj diskutoj. La abato Donadeu (904-917) kaj liaj postsekvantoj kreis novajn preĝejojn en Rubí, Cervelló kaj Castellet del Penedés. Je la fino de la 10a jarcento la posedaĵoj de la monaĥejo etendiĝis ĝis Gavá, Castelldefels, Cervelló, Subirats, Olérdola, Font-Eubi, Lavit kaj Castellet, Igualada kaj Clariana, Montseny kaj Palautordera. Post la morto de la abato Joan, la abato Odó, estonta episkopo de Girona, rekonstruis ĝin kaj atingis de la reĝo Lotari (986) kaj la papo Silvestre II, ateston pri la posedaĵoj de la monaĥejo.

En la XI-a kaj XII-a jarcentoj la monaĥeja vivo estis tre intensa, ĉiam protektata de la Grafoj de Barcelona kaj ĝiaj regopovoj atingis ĝis Castellet, Calders, Albinyana, ktp. En la jaro 1089a la abato Tomeres fariĝis la mastro de la monaĥejo laŭ deziro de Berenguer Ramón II. La granda amasigo de posedaĵoj devigis la abaton Guillem d'Avinyó (1174-1205) krei kvar administraciajn teritoriojn: "Vallés", "Penedés",Palau"kaj "Llobregat", kiuj siavice devis zorgi pri la necesaj nutraĵoj de la monaĥejanoj. La abato Guitard (1013) ekplibonigis la monaĥejon, kies laboroj daŭris ĝis la XVa jarcento, kaj la rezulto estis, konstruaĵo longa je 52 metroj kaj je 23 metroj larĝa, kun multaj kaj gravaj internaj ornamaĵoj, kelkaj el ili ankoraŭ videblaj nuntempe.

La stiloj estas romanika kaj gotika. Menciindaj estas 144 kolonoj de la klostro. Nur en la monaĥejo de la urbeto Silos (Burgos), ekzistas simila kolonstilo.

Malgraŭ la rabado dum la 19a jarcento, ankoraŭ restas grava trezoro arta kaj dokumenta, precipe en la Muzeo de Barcelono, Dioceza Muzeo kaj la Brita Muzeo.

Je la mezo de la 14a jarcento komenciĝis la dekadenco de la monaĥejo, kaj de la jaro 1385 la abatoj estis elektataj de la Papo. Je la fino de la 15a jarcento funkciis okaza presejo. En 1905/6 oni intencis aneksi la abatejon al religia organizaĵo de Valladolid, plej granda

parto el ili apartenantaj al nobelaj familioj. En la jarom 1884 fariĝis la parokejo de Sant Cugat, anstataŭanta la antikvan "Sant Pere d'Octavia". La monaĥejo estas protektata, ekde la jaro 1844 de la Provinca Komitato pri Monumentoj de Barcelono, (sendube hodiaŭ sub la zorgado de la Generalitato), kiu komencis ĝian riparadon dank' al mecenato Elies Rogent. Fine, en la jaro 1925 la monaĥejo estis nomita nacia monumento. De 1968 ĝis 1972 troviĝis en la monaĥejo la Fakultato pri Filozofio, de la nova Universitato Aŭtonoma de Barcelono.

Luis Serrano Pérez

---



## ARTAJ SCIENCAJ KAJ KULTURAJ HOROJ

*La Artaj Sciencaj kaj Kulturaj Horoj de niaj Kongresoj fariĝis grava kaj ŝatata ero de niaj ĉiujaraj renkontiĝoj kaj laboroj.*

*Pri la organizado de tiaj aranĝoj plu zorgas nia samideano Antonio Alonso Núñez, (nia nuna Prezidanto), kiu per tiu ĉi noto invitas ĉiujn HEF-anojn sin proponi mem por roli en la Horoj de la venonta Kongreso en Sant Cugat del Vallés, aŭ sendi al li sugestojn por kiel eble plej sukcesa muntado. Lia adreso estas: str.Rosa, 26,5º C.- 15701-Santiago de Compostela.- Telfno.(981) 59 80 05.*

*Por tiu Kongreso jenaj du eroj estas jam akceptitaj:*

*-"Espeologio: esplorado de kaverno", fare de Luis Gilpérez Fraile. (Prelego kun diapozitivoj plus kolokvo).*

*-"Seminario pri konjugacio en la verko de Zamenhof "Fundamento de Esperanto"- Plurhora universitat-nivela aranĝo, por kiu S-ro Alonso petas kontribuojn. Li prezentos mem studaĵon, kies provizora titolo estas "Provo por formaligi la semantikon de ĉiuj verbonuancoj rolantaj en "Fundamento de Esperanto".*

# VIGLAS LA MOVADO



Santiago de Compostela.-

La Universitato de Santiago aperigis publikan konkurson por oficiala Esperanta posteno en la Instituto pri Lingvoj de la Universitato. Kiel niaj samideanoj jam scias,preskaŭ certe gajnis ĝin S-ro Antonio Alonso Núñez, nia nuna Prezidanto, sendube la plej kompetenta kaj adekvata por okupi la postenon.

...-...

Ekstremaduro.- En Badajoz, samideano José Gonzalez gvidas 7-bazajn E-kursojn por pli ol 200 gelernantoj, inter ili 27 geinstruistoj pri E.G.B. kaj 76 gestudentoj.

En Mérida, la Delegacio pri Kulturo de la Urbestraro anoncis por la lernojaro 1989-90 Esperanto-kursojn en la Instituto pri Sociaj Servoj.

...-...

Madrido.- Decidite de la aktuala HEF-estraro, la Centra Oficejo de la Federacio funkcias de nun en strato Rodriguez de San Pedro, 13.-3º.-P-7.-28015 Madrid. Fakte, la lastaj kunvenoj de la HEF-estraro jam okazis en ĉambroj de tiu sidejo. Oni petas al ĉiuj Esperantaj Grupoj bonvolu sendi siajn bultenojn, revuojn kaj informojn al la indikita adreso.

...-...

La koruso "Verda Stelo" de Madrido partoprenis tre sukcese en la kristnaskaj festoj, ĝi kantis en Soria, invitite de la Provinca Deputitejo, kaj ankaŭ donis koncerton dum meso en la preĝejo Sankta Kruco de Madrido.

...-...

Tre interesaj kaj gravaj la demarŝoj de Madrida Esperanto-Liceo en la Nacia Biblioteko serĉante precizigojn pri la E-libroj kiujn ĝi devus gardi. Verŝajne, en la komputor-listo ricevita, MEL konstatis gravajn erarojn, kaj sekve petis al la institucio la necesajn korektojn,kio, siaflanke,prokrastis la solvon.

Luksemburgo.- La 82a Franca E-Kongreso okazos en la fama franca kastelo de Blois, de la 1a ĝis la 5a de Junio 1990. Interesa Programo: prelego de S-ro Maertens. teatraĵo, ekskurso al la valo Loire, koncerto, bankedo, balo, ktp. Aliĝo senpaga por eksterlandanoj. Skribu al U.F.E. (Kongresa Servo) 4, bis rue de la Cerisaie, 75004-Paris Francio.

...-...

Budapeŝto.- "Internaciaj Interlingvistikaj Kursoj"

Post longaj preparlaboroj, la Esperanto-fako de la Budapeŝta Universitato Eötvös ĝoje raportas, ke ĝi rajtas oferti internacian korespondan interlingvistikan kurson entute en Esperanto. Se estos sufiĉe da aliĝintoj, ĝi komenciĝos en Septembro 1990. La 3-jara kursaro kondukos al ŝtate rekonata diplomo.

Cetere, la nombro de la tagaj gestudentoj finis siajn 3-jarajn postdiplomajn studojn en la enlanda korespondа fako kaj ekde Septembro dek novaj ekstudis tie. Aliĝoj: Eötvös Universitato. Rektori Hivatal Oktatási Osztálya. Budapest.Szerb. u.21-23 I/28. H-1053-Hungario.

...-...

Terrassa.- Geesperantistoj: Aperis nova kartludo por praktiki Esperanton kaj amuziĝi. Partoprenu en monda ĉampioneco pri "Motnaip-ludo". Pli detalajn informojn petu al "TUTMONDE" Apartat 313. E-08220-Terrassa (Barcelona) Hispanio.

...-...

Lodzo.- Sperta esperantistino luas ĉambron el sia komforta domo al geesperantistoj. Bela loko. Ne altaj prezoj. Interesatoj skribu al: S-ino Maria Masiera. Lutomierska, 103. m. 78.-91-046-LODZO. Pollando.

...-...

Sarajevo.- Ni ricevas de Jugoslavia Esperanto-Ligo jenan anoncon kun peto por publikigo:"Jugoslavia Stelo",gazeto de Jugoslavia E-Ligo,serĉas perantojn en nia lando. Interesatoj bonv.sin turni al:"Jugoslavia Stelo"(Esperanto). D.Ozme 7/IV,71000-Sarajevo.Jugoslavio.Jarabono 20 guldenoj.

Sofio.-Kun sama celo kiel la antaŭa anonco "Bulgara E-Asocio ankaŭ serĉas perantojn.Jarabono 32 gdnoj.Skribu,al: "Bulgara Esperantisto".Bul.Ĥristo Botev,97.PK.66.-1303-Sofio. Bulgario.

# KONSIDEROJ PRI LA PRONOMO "CI"

Teorioj pri "idealaj valoroj" plejofte kontraŭstaras la "faktan" sperton aŭ uzon de la aferoj. Tio povus ŝoki fakulojn de multaj sciencoj, sed ne lingvistojn. Pro la propra "armila" karaktero de ilia studcelo, ili povas konstati per historia trarigardo, kiel la priskribo,kiun realigis iliaj pauloj devis submetiĝi al interesoj eksteraj, al la priskribo mem. Se la samo do okazas, ekzemple ĉe la kampo de nia lingvo, tio devas ŝuldiĝi al la intereso konservi monolitan ilon, kiu ne disiĝu neeviteble.



La "ideala valoro" de la pronomo"ci" (ilo por senceremonia alparolo), de ĉiuj konata, ne ŝajnas troviĝi en bonaj amikaj rilatoj kun la "fakta uzo". Ni ne povus nei,ke certaj kolektivoj uzas tiun pronomon kutime (ankaŭ tio estas fakto),sed la kriterioj per kiuj ili praviĝas ĝian uzadon estas tiel heterogenaj, ke oni povus loki la fenomenon preskaŭ en la kampon de la idiolekto.*.Kelkaj kriterioj estas sufiĉe pravigeblaj kaj facile internaciigeblaj (kiel ekzemple tiu de SAT), sen forgeso, ke ĉiam temas pri "parta" uzo. Aliaj tamen (kiel ekzemple tiu de la hispanaj "ciumantoj",tio estas, ci=tú)estas malfacile internaciigeblaj pro sia tuta subjektiveco (ĉu la cetera mondo lernu la hispanan por ĝuste uzi la pronomon?).

Ni unue precizigu, ke ne ĉiuj lingvoj signas ceremoniecon per pronomoj, kaj, due, ke tiuj, kiuj tiel faras, klare maldividas kriteriojn (kiel ekzemplon de la unua ni metu la anglan. Por vidigo de la dua kazo, oni komparu la uzojn de la franca "tu (toi)" kaj la hispana "tú"). La problemo do ŝprucas, kiam tiuj kolektivoj celas trudi sian subjektivan bildon de la afero, apogitan sur"ideala valoro", al la cetero de la parolantoj, kiuj laŭlonge

de la ekzistojaroj de nia lingvo ĝeneraligis la uzon de unusola duapersona formo, kiu estas "vi". Ajna moderna lingvisto (kiu jam alkutimiĝis al la fenomeno de la"variebleco" ĉe la kampo de la -tiel nomataj- naturaj lingvoj) pretas studi kaj analizi la datenojn, tiel, kiel ili doniĝas. La fenomenon "ci" oni do devas studi kaj loki en ĝian ĝustan situon ene de la lingva analizo, akorde kun la datenoj, per kiuj la lingva uzo provizas nin.

Per komenca alproksimiĝo kaj dank'al kontrasto kun aliaj lingvoj (ekzemple la angla, en ĝia mezepoka stadio), ni povus lanĉi la konkludon, ke la prononco"ci" posedas "markitan" rangon rilate sian partneron "vi"."Ci" do okazas en tiaj situoj, kie "vi",pro sia ordinara karaktero, ne ludas la deziritan rolon.

Tiusence ĝi taŭgas interalie al kolektivoj volantaj distingi anojn de ne-anoj (ekzemple),por esperantigi el aliaj lingvoj pronomojn, kiuj havas (aŭ havis) tian valoron (ekzemple la anglan"thou"), por kaŭzi specialan efikon aŭ efekton (en literaturo ekzemple) aŭ por signi specialan alparolon (el kiuj, kial ne?, senceremonieco povus esti unu). Ĝi do estas taŭga kaj konservinda armilo, sed devas okupi sian lokon, kiun la fakta uzo, kaj ne la preskriba principaro, signu por ĝi.

Alberto Franco Ramirez

*Noto de la Redaktejo.- La afero estas malsimpla.Laŭ informoj,la japana disponas dekdu pronomojn por la diversaj karakterizoj de la alparolatoj: rango, supereco, ktp.


---

## PRI PAGOJ KAJ MONDONACOJ.-

Samideano: Ne atendu la lastan momenton por pagi vian jarkotizon:frua pago plifaciligas la taskon de via administrado. Memoru, ke la pagojn vi devas sendi al: Hispana Esperanto-Federacio.-Poŝtkonto nº 14.011.966,Av.República Argentina, 29.- E-41011-SEVILLA.(Hispanio).

Membro-abonanto. . . . . . . . . . 1700,-Ptojn
Emerito,junulo,senlaborulo . . . 1200.- "
Dumviva membro . . . . . . . . . .34000.- "

# LA 50a HISPANA E-KONGRESO




Lastmomentaj informoj de la O.K.K. petas al ĉiuj gejunuloj partoprenontaj la kongreson de Esperanto en Sant Cugat, ke ili,laúeble kunportu dormosakon, ĉar oni rezervis por ĉiuj gejunuloj grandan salonon, kie adekvate povas dormi proksimume 40 personoj.

Kiuj kunportos kamparan tendon, tiuj povos agrable kampadi meze de bela pinaro. Por tiuj, kiuj kunportos dormosakon, la prezo de restado (dormo) kun nura tagmanĝo kostas entute 1200 pesetojn tage.

Nura kampado en la pinaro, sen manĝado, kostas 500 pesetojn tage por unu persono. En la Restadejo bedaúrinde restas nur liberaj 90 loĝlokoj anstataú 150 promesitaj.

Pro tio ni invitas la gejunulojn uzi la dormosakon aú simplan kampadon en la pinaro. Cetere oni povas anticipe mendi manĝon al la O.K.K., minimume 24 horojn antaúe.

Antaúmendoj por rezervigo estos traktataj nur post ricevo de 30% de la kosto de la tuta restado.

Ceterajn rimarkojn jam indikas la Kongresaliĝilo. Enskribu vin tuj ĉe la Kongresa Sekretariejo:"Grup d'Esperanto "Jozefo Anglés", Apartado 336.- 08190 Sant Cugat del Vallés (Barcelona) Hispanio. Samtempe sendu la koncernan pagon al 50ª Hispana Esperanto-Kongreso.-Konto nº 619152 de la "Caixa". c/Santiago Rusiñol, 1-3. 08190 Sant Cugat del Vallés (Barcelona) Hispanio.

# KIAL MALSUKCESIS LA REVUO HISTORIAJ STUDOJ

*Dum atenta legado de la enhavo de la unua numero de "Historiaj Studoj", jara revuo eldonita de la Societo por Studo pri la Historio de Esperanto (SSHE), kiu estis fondita en 1987 en Britio, mi ricevis tre malfavoran impreson pri la revuo. Ŝajnas, ke la antaŭpublikiga entuziasmo de la Sekretario de SSHE, Hilary Chapman, estis tro granda, ĉar la rezulto apenaŭ kontentigas la esperon de movad-historiistoj, kiuj atendis pli altkvalitan periodaĵon. Mi ne intencas tie ĉi verki detalan recenzon pri la enhavo de HS 1. Sufiĉas reliefigo de kelkaj ĝeneralaj kritikoj pri la publikigitaj artikoloj en la koncerna numero (1/1987).*



*Unue, la enhavo ne spegulas la signifon de la revu-titolo, ĉar esence ne temas pri vere <u>prihistoriaj</u> verkoj, kaj, cetere,la kontribuaĵoj neniel povas esti nomataj <u>studoj.</u> Laŭ mia kompreno,studo,aŭ prefere studaĵo, estas zorga ekzameno aŭ analizo de specifa demando. En la unua numero de HS troviĝas plejparte laŭvorta represado de simplaj memoraĵoj sen interpretado aŭ prikomentado. Miaopinie,Stanley Nisbet,centprocente eraras pro sia emfazo pri inkludo de "la romantika elemento" en prihistoria periodaĵo. Ne devas esti loko por tiuspeca subjektiva kaj anekdoteca materialo en HS. Ĝi mem ne konsistigas la historion de Esperanto; temas nur pri parto de la vivhistorio de individuoj, kiuj eble -sed ne certe- ludis signifoplenan rolon en la historio de Esperanto. La verko de D.B.Gregor estas tro mekanike kunmetita rozario da memoraĵoj, kelkaj pli bagatelaj ol aliaj. Tia verko konvenas por aperigo en "La Brita Esperantisto", ne en HS. Ĝia limigita spaco estu*

*uzata nur por vere seriozaj studaĵoj. Ankaŭ riproĉenda estas la inkludo de la kontribuaĵoj de W.Auld kaj D.A. Sinclair. Ili, same kiel "romantikaj memoraĵoj" havas tre limigitan intereson kaj gravecon. Ne estas pravigebla la publikigo de tiuj polvokovritaj kaj flaviĝintaj paperaĉoj. Ili estis devintaj resti en la arkivejoj!*

*Ankoraŭ unu granda seniluziiĝo estas la peco el la plumo de Don Lord. Lia pritrakto de la judeco de Zamenhof estas tro supraĵa. Plue, estas nekompreneble, kiel li aŭdacis verki tiun "studon" sen konsulti la plej gravan verkon ĝis nun publikigitan pri la temo: "La kaŝita vivo de Zamenhof" de N.Z. Maimon (Tokio, 1978). Kompetenta movad-historiisto ne estus preteratentinta tiun nemalhaveblan libron. La sola verko en HS 1, kiu meritas la klasifon de historia studaĵo estas "Kelkaj Esperanto-pioniroj en Kimrujo" de Hilary Chapman. Ĉar ĝi identigas pionirojn de landa movado, pri kiuj ne eblas facile trovi biografiajn donitaĵojn aliloke, tiu artikolo havas valoron por konsultaj celoj.*

*Espereble en la estonteco la redakcio de HS sukcesos akiri pli utilajn studaĵojn, por ke la nova revuo faru originalan kontribuaĵon al la historiografio en Esperantujo.*

*Epilogo:*

*En tiu formo mi surpaperigis miajn pensojn pri la debuta numero de la revuo en Oktobro 1987. Pacience mi atendis la aperon de numero 2 kun mia kontribuaĵo, detala studaĵo titolita "La etna konsisto de Bjalistoko meze de la 19a jc.". Mia espero vidi ĝin en presita formo estis tute vana. HS ne havis estontecon. Kaj agante tute senrespondece, neniu el la funkciuloj de SSHE -nek la Sekretario, H.Ch., nek la Prezidanto, A.D.- degnis informi min pri tio. Mi rehavigis mian tajposkripton nur, post kiam mi reklamaciis ĉe la redaktorino, Kathleen Hall, en Septembro 1989. Tiam mi ricevis de ŝi la mornan mesaĝon, ke "pro manko de sufiĉe grandskala subtenado(...)la redakcio de HS devas rezigni pri la intenco eldoni sekvantajn numerojn".*

*Tiu fiaskinta provo lanĉi HS havas instruivan gravecon por ĉiuj aliaj entuziasmuloj, amantaj fondi novan periodaĵon en Esperantujo. Se ili ne ĝisfunde pripensas kaj antaŭplanas sian projekton, minacos ĝin certa kaj tuja*

*malsukceso. Ĉuste tio okazis al "La Mano", kultura revuo de HEJS, kiu, pro manko de sperto kaj kapablo de la redaktoro, J.C.,malaperis en la abismo de forgeso post la unua numero.(*)*

*La ĉeso de HS lasis malplenan lokon sur la libro-bretoj de pluraj kleraj esperantistoj. Prihistoria revuo ja estas bezonata, sed por ke oni ne sekvu la mispaŝojn de SSHE, estas necese trovi kompetentan redaktoron, bone kvali-fikitan por pritaksi la enhavon de kontribuaĵoj, kaj tiel doni al la periodaĵo la saman karakterizaĵon kiun posedas altnivelaj fakrevuoj publikigataj de universitatoj kaj akademiaj societoj en diversaj etnolingvoj. Estas necese komprenigi al multaj agemaj kaj laboremaj esperantistoj, ke naiva fervoro kaj bona volo ne estas surogatoj de inteli-genteco kaj saĝo.*

*Bernard Golden*

N.de la R.

La Redaktoro de "Boletin" publikigas la ĉi-supran artikolon ĉar konsideras ĝin interesa por niaj legantoj: ni ankaŭ opinias, ke prihistoria revuo, altnivela kaj kun kompetenta redaktoro estas urĝe bezonata en Esperantujo. Kompreneble, tio tute ne signifas, ke ni aprobas la sisteman kaj ĉiam mal-favoran aludon fare de la aŭtoro de la artikolo al esperantistoj. Ni tion ne aprobas!

(*) Plie, ni vere ne bone komprenas la rilaton de artikolo pri Historiaj Studoj kun HEJS kaj ĝia revuo "La Mano". Ankoraŭ malpli la aludon al G.C., brila esperantista junulo, kiu, ne unuafoje montris sian kapablon.Miaopinie, S-ro Golden, verkis bonan artikolon pri interesa temo, sed perdis bonan okazon silenti pri la konkreta kazo de nia juna kolego. A.M.


---

Alia noto de la Redaktoro.-

Ĉar pluraj el niaj legantoj skribis nin pri la blankaj paĝoj aperintaj en la pasinta numero de nia revuo, ni devas ilin respondi, ke tiu fakto ne estas afero nia, sed teknika decido de la Presejo, do ne pagitaj paĝoj, kompreneble, kondiĉe, ke ili restu...ne presitaj.

Trankviliĝu, samideanoj kaj amikoj, kaj ne cerbumu kiel plenigi ilin, originaloj, feliĉe, ankoraŭ ne mankas. A.M.

# RECENZO
# ENKONDUKO AL PROBLEMSOLVA ORIGINALA KJ-METODO




**Figuro 1. Skizo pri Bazaj Paŝoj en Problemsolvado**

Aŭtoro: D-ro Prof.Jiro KAWAKITA.- Trad.:Umeda Jósimo.- Eld.:Japana Esperanto-Instituto.- 48 paĝ. 21.cm. Prezo:10 guldenoj.

Tiu ĉi "W-forma modelo" de Dro Kawakita skizas la sinsekvajn paŝojn por solvado de problemoj per alterna uzado de penso -kaj de sperto- niveloj. La okcidenta scienco ekipis nin per multaj metodologioj ĉefe por la paŝoj CDEFG,-(kun abundega uzo de matematiko) sed mankas en ĝi sistema metodologio por la paŝoj ABCC, kaj tute speciale por CĈ. Nu, la KJ-metodo okupas sin ĝuste pri ŝtopado de tia truo, kun la esenca trajto, ke temas pri metodo pure lingva kaj kvalita, ne kvanta, tiel ke la aro da komence havataj multaj krudaj informoj pri iu afero aŭ fenomeno iĝu kohera tuto kaj adekvata bazo por hipotezoj por la plua laboro, ktp.

La metodo naskiĝis en 1951 por aplikado al Antropologio,sed post plurjardeka polurado ĝi populariĝis en Japanio kaj aliaj landoj por aplikado ankaŭ en ĉiuj branĉoj, el edukado, komerco, politiko, industrio,sociologio, teknologio, por trejnado de fakuloj de entreprenoj, ktp.

La nun recenzata broŝuro, estas nura skiza enkonduko al 600-paĝa libro kiun D-ro KAWAKITA publikigis en 1986, kaj kiun li deziras nun traduki unue en Esperanton, kaj poste en aliajn lingvojn, ponte tra la Esperanta traduko.

Laŭ mia kompreno, aldone al la traduko de la tuta verko,oni devus zorgi pri okazigo de praktikaj kursoj en Esperantio (Academia Sinica,SUK, AIS; HEF havas mem projekto pri inaŭguro de Internaciaj Preuniversitataj Kursoj en 1993 -paralele al la UK en Valencio,ktp.).

Pri la libreto mem, mi plian fojon povas nur danki Japanan Esperanto-Instituton: lingvaĵo ja modela por ni ĉiuj; tipografia aranĝo kaj litero klaraj,belaj; ankaŭ manko de preseraroj; papero tre plaĉa al vidado kaj tuŝado.

Antonio Alonso Núñez

# ANONIMAJ ROMANCOJ

En la historio de la hispana beletro ekzistas sorĉaj anguloj,kies legado vekas en la interno de ni, ne nur la plaĉon pro la beleco de tiuj pecoj, sed ankaŭ la plezuron kiun oni sentas malkonante ion kies ĉarmon oni ne perceptis ĝis tiu momento. Tiel okazis al mi, jam antaŭ longe, kiam mi legis unuafoje la antikvajn hispanan kanzonaron kaj romancaron, grandparte el ili anonimajn. Tiuj poemoj havas certan delikatan fajnan belecon troveblan nur en la sovaĝaj floroj,(permesu al mi la komparon).

Mia surprizo estis granda, kiam mi konstatis, kaj konstatas,ke tiu sento ne forpasis: ĉiufoje kiam mi legas tiujn simplajn kaj belegajn poemojn, mi sentas saman emocion, similan admiron, identan plezuron kiel en tiu unua okazo. Jen unu el tiuj mezepokaj anonimaj romancoj, nun jam sufiĉe konata, kaj tamen ĉiam freŝa kaj naive ĉarma:



"ROMANCO PRI AMANTO KAJ LA MORTO"

Sonĝon nokte mi trasonĝis,
revon de animo mia!
mi sonĝis pri miaj amoj
per brakumoj retenitaj.

Mi vidis damon tre blankan,
pli blankan ol neĝo frida...
-El kie vi venas?, kara,
-Kiel eniĝis vi, sprita,
se fenestroj, ĵaluzioj
kaj pordoj estis fermitaj?-

-Kara, mi Amor' ne estas,
sed la Mort' de Di' sendita-
-Ho vi, tre rigora Morto:
lasu min tuttagon viva!-
-Eblas ja nur unu horon
kaj finiĝos vivo via!

Rapide piedvestiĝis,
tuj li estis tutvestita,
li alkuris al la strato
kie loĝis l'amo lia...

-Malfermu la pordon, kara,
malfermu ĝin tre rapida!-
-Por mi estus vere plaĉa
se la okaz'estus facila,
sed ja panjo ne dormadas,
paĉjo nun ne forintas-

-Se vi, nun, ne tuj malfermas,
vi faros tion neniam!
la Morto al mi kursekvas,
kun vi, viv' aŭtentikiĝas!-

-Sub mia fenestro iru,
kie mi kudradis iam,
kaj por ke vi ĝin atingu
mi surmetos ŝnuron silkan-.

-Se la ŝnuro ne sufiĉus
ĝis tiu fenestro mia
tutplezure mi aldonus
mian hararon plektitan-

La fajna silkŝnur rompiĝas.
La Mort'aperas fidela:
-Ni iru!- La hor' limiga
por la Amant' venis kruela.

Elhispanigis A.Marco Botella

---

## VIGLAS LA MOVADO...

Kubo.- La 24a ILEI-Kongreso okazos ĉi-jare en Hanabila (Kubo)post la Universala Kongreso,de la 21a ĝis la 28a de Julio. Informoj:M.Jones, 41 Canseway.Chippenham.Wiltshire, SN 15- 3DD. Britio.

Tallinn.- La Estona Radio elsendas ĉiuĵaŭde en Esperanto je la 21,20 h. laŭ Universala tempo, 22,20 h.laŭ Orient-Eŭropa tempo, kaj 0,20 laŭ la Moskva. Ondolongoj 290,m. 1035 kHz.-50,6 m. 5925 kHz.Bonvolu skribi pri la programoj: Estona Radio.(Esperanto) SU-200100 Tallinn. URSS.

Padova.- La 61a Itala E-Kongreso okazos de la 24a ĝis la 31a de Aŭgusto 1990.Aliĝojn vi povas pagi ĉe:Poŝta konto 11592-359, Prof.Fiorentin Fiorello,via Barbieri,18 35126-PADOVA.Italio.

# EL POPOLA ĈINIO

Denove alvenis ĝenerala abonvarba periodo!

Ci-jare, ekde la 1ª de Oktobro ĝis la 28a de Februaro 1990, kaj post kvar jaroj de sensanĝaj abontarifoj, estas nun reviziitaj kaj fiksitaj laŭ jenaj indikoj:

1 JARO:1.500 Ptojn, 2 JAROJ:2.400 Ptojn 3 JAROJ:3.400 Ptojn

Sed ne timu, ni ofertas specialajn abontarifojn por premii la fidelajn reabonantojn kaj por stimuli la bonvenajn novajn abonantojn, per neripeteblaj kondiĉoj. Vidu sekvantan tabelon kaj kaptu tian unikan okazon por aboni aŭ reaboni ambaŭ revuojn:

| | | El Popola Cinio | | | China Construye |
|---|---|---|---|---|---|
| | | 1 jaro | 2 jaroj | 3 jaroj | Ofic.tarifo |
| El Popola Cinio | Spec.tarifo | 1350 | 2160 | 3060 | |
| China Construye | 1 año | 2250 | 2925 | 3675 | 1500,- |
| (hispanlingve) | 2 años | 2925,- | 3600- | 4350,- | 2400,- |
| | 3 años | 3675,- | 4350- | 5100,- | 3400,- |

Skribu al S-ro Félix Gómez Martin.c/Corbeta,8.-5º A 28042-MADRID. (Hispanio). Atentu, ne sendi monon per BANK-TALONO, prefere per POŜTMANDATO aŭ al konto 2038-1828-6001254115 "Caja de Madrid" en Zona Ind. nº 1 Aerp.Barajas 28042-MADRID. Atentu la REABONANTOJ: por daŭre ricevi seninterrompe la revuon, renovigu la abonon antaŭ ol ĝia finiĝo. DANKON!

---

ESPERANTO VIDEO-SERVO.- Samideano Antonio Sarmiento starigis "INTERNACIAN E-VIDEO-SERVON, kun kelkaj Sekcioj:Ĝenerala Kulturo, Lingva, Seksa, Distra Kulturoj, ktp.

Video-laboroj: Kopioj en ĉiuj formatoj, transigoj de fotoj, diapozitivoj kaj kinofilmoj (8-16-35 mm.) al vidbendo;muntadon, titoligon, muzikigon kaj sonorigon de kiu ajn video-materialo;realigon de programoj laŭ personaj skizoj kaj indikoj. Tiuj laboroj povas temi aŭ ne pri Esperanto sed por esperantistoj estas je favoraj prezoj.

Skribu al: ESPERANTO VIDEO-SERVO. c/Espartero, 1.-3ª.-13. E-35010 LAS PALMAS DE GRAN CANARIA. Islas Canarias. Hispanio.



## ĈU UNIVERSALA KONGRESO EN VALENCIO?

Ĝis nun, kelkaj malavaraj samideanoj kaj Esperantaj Asocioj, komencis oferi financan helpon por la organizado de Universala Esperanto-Kongreso en la jaro 1993 en la bela Valencio, kiu, se ni ĉiuj kunlaboras, sendube estos unu el la plej imponaj de la Esperanta historio.

Tiuj malavaraj samideanoj kaj E-Asocioj, kiuj jam sin anoncis pretaj por tiu financa helpo estas:

| | | | |
|---|---|---|---|
| Grupo Esperanto de Alicante.......... | 1.000,- | Ptoj | monate. |
| Grupo Esperanto de Callosa de Segura | 500,- | " | " |
| Grupo Esperanto de Valencia ......... | 500,- | " | " |
| Esperanto Fundacio "F.Soler"......... | 500.- | " | " |
| "Juna Suno"......................... | 500.- | " | " |
| | | | |
| Ekstremadura esperantisto ........... | 1.000,- | " | " |
| Madrida " ........... | 1.000.- | " | " |
| Madrida samideanino.................. | 500,- | " | " |
| Valencia samideano................... | 1.000,- | " | " |
| Segovia " ................... | 1.000,- | " | " |
| Valencia " ................... | 5.000,- | " | unufoje. |
| "Frateco" E-societo de Zaragozo ..... | 5.000,- | " | dufoje. |

Oni bezonus atingi ĝis proksimume 30.000 ptojn.monate por garantii la sufiĉan kapitalon, kiu kovrus la elspezojn de la unuaj demarŝoj por la organizado de la kongreso, kaj por dungi spertan samideanon, hispanan aŭ eksterlandan, dum unu jaro antaŭ la Universala Kongreso, kiu laborus nur por ĝi.

Ĉiu kiu deziras fariĝi kunlaboranto aŭ sendi donacojn tiucele, bonvolu skribi al la Grupo de Esperanto Valencia, aŭ sendi monon rekte al tiu ĉi adreso:

Grupo de Esperanto Valencia (U.K.-93)
Caja de Ahorros de Valencia.
Sucursal 0069,Urbana Marchalenes
Cuenta corriente 3100537732.-VALENCIA.

# ESPERANTO KAJ UNIVERSITATO

Evidente la akcepto de Esperanto fare de la hispanaj universitatoj signus limŝtonon en la disvastigo de la Internacia Lingvo kaj maturiĝo de la Movado en nia lando. Ĉu utopio? Ĉu atingebla futuraĵo? Ĉiukaze antaŭ ol opinii, taŭgas pristudi la aferon serioze.

Aliflanke surprizas, ke esperantistoj konantaj la universitaton, ĉar ili frekventas ĝin, nenion ili diras pri la reala situacio de nia lingvo en tiel grava kultura institucio. Mi, nek laboras en universitato, nek en supera lernejo, tamen mi proponas jenajn atentindaĵojn, kiuj fariĝus tre utilaj, se aliaj samideanoj havigos informon kaj partoprenus debaton pri la afero.



a) Nur en iuj universitatoj rolas Esperanton en nia lando tamen la profesoroj, preskaŭ ĉiuj,ne atentas la lingvon. La helpo devenanta de la universitato estas ridinda,ĉar malabunda kaj senrespondeca. La universitatanoj ne allogas siajn kunulojn al Esperanto kaj la Movado. Dume,la tempo kuras.

La esperantistoj diplomitaj de la universitatoj neniom influas la modifon de opinioj kaj sintenoj de la hispanoj rilate al Esperanto.La esperantistoj havantaj universitatajn diplomojn tre malofte helpas la aliajn samideanojn laborantajn rekte por Esperanto en la E-Grupoj kaj E-Asocioj. En Hispanio, la universitatanoj ne akceptas partopreni seminariojn,k.s. pri planlingva afero.

b) Tute certe, la rolo de Esperanto en la hispanaj universitatoj estas tre malofta, ne organizita kaj negrava.

La hispana universitato ankoraŭ ne konscias la gravecon de Esperanto. Ŝajnas, ke iuj diplomitoj, licenciuloj, k.s. el la hispanaj universitatoj hontas defendi Esperanton,kvankam intime ili sentas sin esperantistoj. Iuj titoluloj

el la universitato eĉ forlasas la Movadon post sia laborado en Esperantaj organizoj.

La hispanaj universitatanoj malmulte scias pri la Internacia Lingvo. Tio estas vere danĝera, ĉar ofte ili fanfaronas misjuĝante ion nekonatan. Iuj universitatanoj opinias, ke ili tre utilas al Esperanto ne klopodante pri la ĉiutaga agado en la E-organizoj sed tute ekskluzive pri teoriaj aspektoj de la lingvo. Tiaj personoj ankaŭ kulpas pri la stagno de la Movado en nia lando,, eĉ en kelkaj kazoj opinias Esperanton taŭga por malinteligentaj personoj, neinteresa kultura evento kaj malatentinda afero.


c) Reale, Esperanto, ne integriĝas en la universitatoj, kvankam, de tempo al tempo, okazas en ili Esperantaj kongresoj aŭ Esperantaj kursoj. Ŝajnas tre probable,ke se E.enkorpiĝus en la hispanaj universitatoj, la hispanaj kleruloj ŝatus nian lingvon. Jen kial, la nunaj klopodoj en tiu direkto de la HEF-Prezidanto estas interesa kaj aplaŭdinda ĉar evidente ne sufiĉas la agado de iuj unuopuloj.

d) Universitatanoj klopodu partopreni en "kulturaj semajnoj" k.s. en siaj Fakultatoj prelegante pri la lingvoproblemo. Ili mem organizu, aŭ instigu al organizado de simpozioj, rondaj tabloj, seminarioj,k.s. pri komunikadproblemoj, lingvistiko kaj esperantologio. Universitatanoj, ĉu instruistoj aŭ ne, verku rekte en Esperanto. Tiel ili prestiĝigos la Lingvon en la universitato kaj plifirmigos la fidon de la hispana esperantistaro.

La rivaleco kaj la malsimpleco de nia socio postulas pritrakti serioze kaj profesie la problemojn. Do, ne forgesu tion la aktivuloj respondecaj en universitataj medioj.Konvenas, ke esperantistaj universitatanoj kunlaboru efike kaj daŭre en la difinado, evoluigo kaj riĉigo de la internacia kulturo ekzistanta en nia Movado.

Zorgu ne miskompreni la realon. En la Universitato oni studas travivaĵojn, tamen ili okazas preskaŭ ĉiam ekster ĝi. Por sukcesi oni nepre atentu tion.

Andrés.



# BELAĴOJ EL HISPANIO

Palaco Aljaferia de Zaragozo.- Estis konstruita tiu ĉi araba palaco de la duono de la XI$^{a}$ jarcento, laŭ ordono de la dua monarĥo de la Zarakosta tajfo Abu-Jafar Ahmed Almoctadir bilah. Oni ĝis konstruis kiel distran vilaon, aŭ "amuzan domon", kiel laŭvorte oni ĝin nomis. Situanta laŭlonge kaj centre de ortangula korto, ĉe kies malpli gravaj flankoj ekzistis du grupoj da salonoj, kiuj okupis unu solan etaĝon, ĝi estis realigita per malbonkvalitaj materialoj, briko kaj gipso precipe, kaj kvadrataj ŝtonoj por la ekstera ĉirkaŭmuro.

Post la konkero de Zaragozo fare de Alfonso la 1$^{a}$ en la jaro 1118, la Aljaferia palaco restas kiel sidejo de kristanaj monarĥoj, kiuj restaŭris kaj ampleksigis ĝin surmetante novan etaĝon sur la muzulmanan konstruaĵon. La plej gravaj el tiuj aldonaj konstruoj okazis sub la regado de Pedro la IV$^{a}$, kaj precipe de la Katolikaj Reĝoj Isabel kaj Fernando.

Zorge rekonstruita, ĝi servas nun kiel sidejo de la Parlamento de la Aragona Komunumo.

..... ..... .....

Depósito legal: Z-334-90
Presejo: Aragonesa de Reproducciones Gráficas